Somer’ en Greziljon’

(tango)

muziko kaj paroloj : Lorenzo Tomezzoli

R
Jen kantet’ pri simpla rememor’
Kun ĝojo en la kor’
Pri fora pasinteco
En somer’ , en tiu-ĉi kastel’
Aperis la juvel’ de forta milda sent’ ...
En basen’ lerte naĝadis vi
Kiel fiŝeto ora,
Kaj rigard’ de vi atingis min
Per verda ĝia bril’
Nun kun vi al tiu-ĉi kastel’
Kastel’ de l’ rememor’
Kune reiras ni
Al kastel’ kune reiras ni .

1
Kaj ĉirkaŭ la kastel’ nun floras la kampar’
En ĝardeneca land’ kun milda suno.
Al-logas la printemp’ per tia klara lum’
Al-logas al reven’ al tiu loko
Sed por ni la plej bela travivaĵo
Okazis tie, en la somero
Kiam mi eklernadis Esperanton :
Estis miraklo renkonti vin ...

R
Jen kantet’ pri simpla rememor’
Kun ĝojo en la kor’
Pri fora pasinteco
En somer’ , en tiu-ĉi kastel’
Aperis la juvel’ de forta milda sent’ ...
En basen’ lerte naĝadis vi
Kiel fiŝeto ora,
Kaj rigard’ de vi atingis min
Per verda ĝia bril’
Nun kun vi al tiu-ĉi kastel’
Kastel’ de l’ rememor’
Kune reiras ni
Al kastel’ kune reiras ni .

2
Al tiu-ĉi kastel Kastel’ de Greziljon’
Lerte gvidadis nin amika voĉo :
La lok’ de la gvidil' konata estas nun
Kaj la sate-litar’ bone funkcias
Sed tamen iomete mi bedaŭras
Ke la gvidilo , malgraŭ la streboj
Kiam ni program-vokis Esperanton
Ĝi rifuzadis agnoski ĝin ...

R
Jen kantet’ pri simpla rememor’
Kun ĝojo en la kor’
Pri fora pasinteco
En somer’ , en tiu-ĉi kastel’
Aperis la juvel’ de forta milda sent’ ...
En basen’ lerte naĝadis vi
Kiel fiŝeto ora,
Kaj rigard’ de vi atingis min
Per verda ĝia bril’
Nun kun vi al tiu-ĉi kastel’
Kastel’ de l’ rememor’
Kune reiras ni
Al kastel’ kune reiras ni .

3
Do, ĉu en Greziljon’ la esperantistar’
Pri tiu-ĉi fabel’ bone memoras ?
Kaj se tiu rakont’ nur estas inventaĵ’
L’animon de l’ Kastel’ ja ĝi spegulas
Ĉar ŝvebas la etoso de kulturo
Internacia, kaj familia :
Tiu , kiu elektas Esperanton
En la homaro rekonas sin...

R
Jen kantet’ pri simpla rememor’
Kun ĝojo en la kor’
Pri fora pasinteco
En somer’ , en tiu-ĉi kastel’
Aperis la juvel’ de forta milda sent’ ...